

KTP!
LA REVUO DE LA
USONA ESPERANTISTA JUNULARO
VOL. II, N-RO 12

# KTP!

624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
jtruong@loyola.edu
ISSN 1078-6554

Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the authors and not of USEJ or the Editor.

Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuaĵoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoro kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.

*Redaktoro/Editor:* Jozef Truong
*Kompostisto/Layout:* Sybil Harlow

*Limdato por n-ro 13: la 7 de oktobro*
*Deadline for issue 13: October 7*

Articles may be submitted via email to usej@webcom.com (please use the ASCII-x format)

Artikoloj povas esti senditaj per reto al usej@webcom.com (bonvolu uzi la ASCII-x-formaton )

© 1995 Usona Esperantista Junularo

## Karaj Amikoj,

Mi finfine havas nun propran retadreson (jtruong@loyola.edu), do vi ja nun povas kontakti min 24 horojn ĉiutage, 7 tagojn ĉiusemajne pri ĉio, Esperanta kaj ne-Esperanta. Do, se vi iam volis scii pri la sekretoj de USEJ, la onidiraĵojn aŭ simple babilumi freneze kun nekonatulo, sendu noton al mi!

Pri aliaj, pli gravaj aferoj, la junulara programo ĉe la Nacia Kongreso ĉi-jare ja estis sukceso. Sed, mi permesos, ke aliaj rakontu al vi siajn spertojn. Jam estas la tempo prizorgi la programon por la venonta Nacia Kongreso, do eksendu tiujn bonegajn ideojn! Nun mi mem ekspertas la universitatan vivon kaj vere interesiĝas pri kiel fartas aliaj universitataj E-istoj (cetere, ne nur usonaj). Kiel oni povas aktivi en la movado kaj samtempe studi? Ĉu oni faru ambaŭ samtempe? Interesus min ankaŭ kiel aspektas Esperanto al diversaj universitataj studentoj tra la lando, kaj eĉ ebla komputila ligo (iel) inter universitataj Esperantistoj.

Do, ĉio por nun!

Joĉjo Truong

## What's inside...

Aferoj, amuzoj kaj la ELNA kongreso ............... 3
BENNEM ............... 4
Vere neforgesebla travivaĵo — la spertoj de Gaj Menaĥem ĉe la UK kaj IJK ..... 5
Lingva Angulo: Klingono ... 6
KTP-aĵoj ................ 7

*Usona Esperanista Junularo*

USEJ is a non-profit, national organization for US Esperantists 27 years old and under.

Donations, subscriptions, etc., can be made payable to "Usona Esperantista Junularo" and sent to the treasurer or the ELNA CO.

USEJ estas senprofita organizo por junaj (malpli ol 27 jaraj) Esperantistoj en Usono.

Donacoj, abonoj, ktp. pageblas al "Usona Esperantista Junularo" kaj sendeblas al la kasisto aŭ la ELNA Centra Oficejo.

Membership/Membreco: $15/year
Subscription to KTP!/ abono al KTP!: $15/year

Treasurer/kasisto
Nathan Treadway
3769 South A Street
Richmond, IN 47374

USEJ Central Office
3600 Data Dr., #591
Rancho Cordova, CA 95670
(916) 853-3465
usej@webcom.com



 ★ Asteroids named "Esperanto" and "Zamenhof" were discovered by Y. Vaisala. ★

# AFEROJ, AMUZOJ KAJ LA ELNA KONGRESO

***La 43a jarkongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko estis granda sukceso kaj por ELNA kaj por la junaj USEJ-anoj kiuj ĉeestis ĝin. Dum la semajnfino de la 14-a ĝis la 17-a de julio, 1995, dek USEJ-anoj kunvenis ĉe la "Fashion Institute of Technology" en Manhatano, Novjorko, kaj ĝuis la okazon paroli Esperanton kun multaj diversaj, interesaj personoj. Krome, ni amuzis nin per kelkaj agadoj, kaj fakte ni eĉ prizorgis gravajn aferojn de USEJ.***

Antaŭ la oficiala komenciĝo de la konferenco, malplejparto de la nova estraro de USEJ kaj aliaj junuloj kunvenis dum vendredo por "tajdaji" T-ĉemizojn kaj ornami ilin per belaj emblemoj de Esperanto kaj USEJ. Ankaŭ, oni parolis pri nia oficiala renkontiĝo kun la estraro de ELNA.

Dum la sabata mateno, la kongreso vere komenciĝis. Tiam, la plejparto de la ĉeestantoj alvenis kaj unue registriĝis kaj neformale babilis dum ĉiuj ĝuis etan "kontinentan" matenmanĝon. Post tio, Joseph Truong, Sybil Harlow, Jed Meltzer, Steve Blackstone kaj Guy Menahem frontis la penigan pridemandadon de la ELNA-estraro kun bona sukceso. Ni diskutis kelkajn ideojn pri la estonteco de USEJ kun la ELNA-estraro kaj ankaŭ informis ĝin pri la nuna stato de USEJ. La pliparolitaj ideoj inkluzivas havigi oficialan statuton de "senprofita organizo" por USEJ, helpi junaj esperantistoj en militsuferantaj landoj, establi rilatojn kun junaj Esperanto-lernantoj en usonaj lernejoj ktp. Ankaŭ, kaj ne plej malgrave, ni diskutis la buĝeton de USEJ! Ĉiukaze, la estraro estis tre impresita pri USEJ kaj feliĉe laboris kun ni. Ĉiuj konsentis, ke kiam la plej aktivaj uloj de ELNA "grizhariĝas", la nun junaj esperantistoj eĉ pli graviĝos por la estonteco de la Esperanta movado. Certe ŝajnas ke USEJ daŭros eĉ pli grava kaj efika parto de ELNA dum longa tempo.

Post tiu grava okazo, la junuloj komencis vere amuzi sin, ĉar ni havis biletojn por vidi la bonegan teatraĵon "La Mizeruloj" (Les Misérables) en la "larĝavojo" (Broadway). Do, unue ni spertis interesan klopodan uzi la novjorkan metroon, kiu estas tre efika se oni konas Novjorkon, sed ni certe ne konis ĝin. Ĉiukaze, ni finfine alvenis al la "larĝavojo", kaj ĝuis bongustan, sed rapidan tagmanĝon en ĉarma restoracio. Ni zorgis alveni ĉe la teatro sufiĉe frue, sed post kiam ni sukcese alvenis kun tempo por ŝpari, du televido-ĵurnalistoj de la Nederlanda "CNN" volis intervjui nin. Fakte, ili volis vidbendigi nin dum ni faris naturalan konversacion en Esperanto. Do, ni naturale parolis pri nia zorgo povi eniri la teatron malfrue. Post nia konversacio, ili intervjuis nin kaj revenis al la konferenco por vidbendigi plu. Post tio, ni eniris la teatron, sed devis atendi ĝis la fino de la unua sceno. Tamen, la teatraĵo estis bonega kaj ĉiuj tre ĝuis ĝin. Post tio, ni promenis tra la urbo. La plej grava momento estis kiam ni trovis malgrandan replikon de la statuo de libereco, kaj ni vestis ŝin en la verda flago de Esperanto kaj fotis nin antaŭ ŝi. Kelkaj personoj rigardis nian strangan agon, sed malmulte, ĉar ili estis novjorkanoj. Post nia ekskurso, ni revenis al la konferenco por ĝui la Esperantan muzikan koncerton de nia kebeka amiko, Reĝo, unu de la rokmuzikistoj de la grupo AKVO. Ĉiuj ĝuis neformalan, trankvilan vesperon en la kongresejo krom mi, ĉar mi devis foriri por trafi mian buson al Brooklyn, kie mi loĝis dum la konferenco. Tio estis mia perdo!



Dum la dimanĉa mateno estis la fakgrupaj kunsidoj, dum kiuj USEJ prezentis sin al ĉiuj kiuj volis ĉeesti la kunsidon. Post tio, estis diversaj prelegoj kaj kunsidoj. Mi mem ĉeestis la prelegon de la fizikisto Konrad Hinsen pri "kio estas likvaĵo," kiu fakte estis sufiĉe interesa. Ankaŭ, mi ĉeestis la prelegon de KAŬAMURA Jasunori, juna japana esperantisto, kiu paroli pri Japanio, la japana Esperanto-movado kaj la religio "Oomoto."

Ankaŭ dum dimanĉo, USEJ faris oficialan estrarkunsidon, dum kiu ni prizorgis kelkajn gravegajn aferojn de la organizo, inkluzive ratifi ĝian oficialan statuton. Post tiu longa, peniga sperto, ĉiuj aŭskultis la interesan kongresan temprelegon de D-ro David Jordan pri "La valoro de Esperanto en internaciaj rilatoj." Post tio, kelkaj junuloj ĉeestis la bankedon de la konferenco, dum aliaj simple aĉetis picaon. Fine, okazis la prezentado de premioj por la lokaj kluboj. Post tio, okazis distra vespero sed, denove mi devis foriri por trafi la buson.

Ankaŭ dum lundo, okazis multaj interesaj aferoj, kunsidoj kaj prelegoj, sed mi ne povis ĉeesti lunde. Malfeliĉe, mi devis maltrafi multon de la kongreso, ĉar mi ne povis plu resti en Novjorko, sed ĉio kion mi ĉeestis estis interesa, spertinda okazo. Mi certe konsilas, ke ĉiu esperantisto, aŭ juna aŭ maljuna, ĉeestu la venontjaran konferencon.

☆Jed Meltzer
Pittsburgh, PA

## Via Nova Estraro


Daniel Cuthbert, prezidanto
Sybil Harlow, sekretario
Nathan Treadway, kasisto
Jed Meltzer, eksteraj rilatoj
Matthew Horton, eksteraj rilatoj
Theresa Makin, internaciaj rilatoj
Gaj Menaĥem, lokaj kluboj

---

Randy Dean, TEJO-komisiisito
(kaj nova ELNA-estrarano!)
Joseph Truong, KTP!-redaktoro

---

Bonvolu noti la novajn adresojn de la USEJ-centra oficejo kaj KTP! (skribitajn aliloke en ĉi tiu numero)



# Vere neforgesebla travivaĵo

***Saluton.* Mia nomo estas Gaj Menaĥem, kaj mi estas via USEJa estrarano pri lokaj kluboj. Ĉi-pasintan someron, mi partoprenis la Universalan Kongreson en Tampere, Suomio, kaj la Internacian Junularan Kongreson en Serovo, Rusio. Mi neniam forgesos miajn spertojn.**

Suomio estas tute malsimila al mia hejmŝtato, Florido. La ĉielo estas nubplena kaj malvarma, sed dum la somero, preskaŭ neniam malluma. Mi ege supriziĝis, dum mi ĉiam devis surporti jakon pro la malvarmo --- dum somero! Tamen, estis bona ferio el nia kutima varmegeco en la Sunbrila Ŝtato. Helsinki estas ege komforta, pura kaj sekura urbo, kaj ege ĉirkaŭebla kaj ĉirkaŭinda pro la mara beleco.

Post tri memoridaj tagoj en la ĉefurbo, mi vojaĝis trajne al la Kongresurbo - Tampere. La vojo estis ege bela. Suomio estas vera verda kaj blua lando - multaj arbaroj kaj lagoj! Kaj jen ni atingis nian celon. Mi ne povis atendi. Finfine, mia revo, kaj revo de multaj aliaj - renkonti homojn el ĉiuj landoj, kaj paroli unu komunan lingvon.

La Kongreso estis bonege kaj forte planita, kaj ĉio funkciis glate. Ho, kia bela vidaĵo, vidi pli ol 2000 homojn de la tuta mondo, kantantajn kune "La Espero"-n, nian himnon, nian batalkanton por frateco, paco kaj mondskala egaleco. La multaj diversaj kunsidoj, konversaciaj rondoj, koncertoj kaj teatraĵoj estis ege interesaj kaj distraj. Mi neniam forgesos mian ĉeeston ĉe geedziĝo de du kongresanoj en bela ligna preĝejo. Kvankam la diservo estis en la sveda, la Internacia Ĥoro kantis Esperante. Mi lernis iomete da Suomlingvo, pri Sibelius, la Suomaj arbaroj kaj filozofio --- en Esperanto. Mi babilis, debatis, gramatikumis kaj dancis --- ĉiam Esperante! Mi vizitis la faman Leninan Muzeon de Tampere, kaj eĉ tie, la gvidado estis en nia lingvo. (ankaŭ estis speciala ekspozicio pri la interrilatoj de Esperanto kaj Laboristmovado.) La tuta semajno estis unu lerna travivaĵo.



**Apud la kongresejo, UK, kun Zoltán, hungara amiko.**

En Tampere, mi renkontis homojn. Ne Suomojn, Hungarojn, Japanojn kaj Brazilanojn, sed homojn. Mi ne vidis la malsamecojn -nur la similecojn. Ni ĉiuj vivas sur ĉi tiu tero, ni ĉiuj spiras, ni ĉiuj amas. Kaj en Tampere, ni ĉiuj eĉ parolis la saman lingvon, kiu unuigis nin eĉ pli.



**Antaŭ la Ĥermitaĝo kun amikoj**

La busvojaĝo inter la du landoj estis iomete amuza. Estis tute klare, kiam oni trapasis la bordon, kiu ne ests la plej amikema. Tamen Rusio ne estis ŝoko por mi. La IJKejo estis tute malsama al la luksa Tampere-talo. Pli taŭge junuleme, la kongreso estis ĉe infana ripozejo en arbara regiono. Kia ĝusta loko por "Woodstock"-ema renkontiĝo! Ankaŭ ĉi tie estis multaj interesaj klasoj, menciinde lingvo-klasoj de la rusa, belarusa, ukraina, ĉuvaŝa kaj tatara, kiuj montris la lingvan diversecon de la plej vasta lando en la mondo kaj la ĉirkaŭa regiono. Mi ankaŭ partoprenis kunsidon pri la milito en Ĉeĉenio. La diskutado estis

plenplena kaj provokema. Mi lernis la Tangon. Mi teatrumis. Kaj neniu IJK estus plena sen ligno-fajro kaj ĉiu-nokta diskoteko, ĉu ne? La plej memorinda ero por mi estis sendube la vizito al Leningrado. Kia bela urbo! La konstruaĵoj, homoj, kanaloj kaj ne forgesu la Hermitaĝon! Ĉio estis grandskala, multkolora kaj preskaŭ reva.

Vizitante Rusion, mi konstatis kiaj bonŝancaj ni vere estas ĉi tie. Kvankam ĉio estis agrablega, tamen oni facile povis vidi la multajn malfacilaĵojn de la rusa ĉiutaga vivo. (Ekzemple la necesejojn!!!) La 51a IJK finiĝis solene kun kisoj kaj brakumoj kaj kantoj.

Mi revenis Helsinkien kaj denove vidis la fortecon de Esperanto. Geedza paro, kiu neniel konas min, gastigis min kaj du aliajn samideanojn dum du noktoj! Kaj dum ni sidis aŭ babilantaj aŭ vespermanĝantaj, ni sentis kvazaŭ konite, familie. Du denovajn tagojn mi ĉirkaŭis la belan maran urbon.

Reveninte hejmen, mi multe pripensis miajn vojaĝojn. Estis por mi, mia unua vojaĝo sola, sen familio. Sed plej grave, mi lernis pri aliaj landoj, pri aliaj vivmanieroj, uzante la internacian lingvon de Zamenhof. Mi renkontis homojn el ĉiuj landoj, kaj reprezentis la mian. Esperanto malfermis pordojn multajn por mi. Mi vojaĝis al Suomio kaj Rusio, tamen mi ekkonis tutmondan homaron. La sola afero, kiun mi nun povas diri estas :




**Ĝis '96** ☆ Gaj Menahem
Clearwater, FL

## Lingva Angulo

Ĉi tiun monaton, ni invitis Mark Shoulson <shoulson@cs.columbia.edu> traduki kelkajn frazojn de sia alia ŝatata kreata lingvo, Klingono, al Esperanto. Laŭ li, la normalaj frazoj kiujn ni uzas malbonas ĉar ili estas tro ĝentilaj, kaj se vi parolas kun iu Klingonano tiu maniere, li certe pensas ke vi estas ruza ĉar vi ni parolas rekte kaj ne diras kion vi volas, sed vi provas kaŝi viajn celojn malantaŭ artifiko.

- **Kion vi volas? <anstataŭ "Saluton">**
  nuqneH *(nukNEĤ)*
- **Sukceson! <anstataŭ "Bonan Tagon!">**
  Qapla' *(kĥapl)*
- **Mia nomo estas . . .**
  ... 'oH pongwIj'e' *(... oĥ pongwiĝ-E)*
- **Ĉu vi parolas E-on?**
  *Esperanto* Dajatlh'a'? *(Esperanto daĝatl-A)*
  Al pluraj homoj *Esperanto* bojatlh'a'? *(E-o boĝatl-A)*
- **Rezigni aŭ morti!**
  bIjeghbe'chugh vaj bIHegh *(biĝegBE-ĉug vaĝ biĤEG)*
- **Kie vi kaŝis la ĉokoladon?**
  nuqDaq yuch Dapol? *(NUKdak yuĉ daPOL)*
- **No problem!**
  qay'be' *(kaj-be)*
- **Kio okazas?**
  qaStaH nuq? *(KAŜtaĥ nuk)*
- **Mi komprenas.**
  jIyaj *(ĝiJAĜ)*
- **Mi ne komprenas.**
  jIyajbe' *(ĝijaĝBE)*
- **Via panjo havis glatan frunton!<insulto>**
  Hab SoSlI' Quch! *(ĥab ŝoŝLI kĥuĉ)*
- **Kie estas la necesejo?**
  nuqDaq 'oH puchpa''e'? *(NUKdak oĥ puĉPA-E)*

Oni povas kontakti la Klingonan Lingvo-Instituton por pli da informoj ĉe P.O. Box 634, Flourtown PA 19031-0634 USA [necesas SASE], aŭ lawrence@kli.org , angghal@aol.com , aŭ ilia TTT-paĝo ĉe http://www.kli.org/




### Retservoj pri junaj esperantistoj?

Por tiuj el vi kiuj maltrafis la novan adreson de la World Wide Web de USEJ, jen ĝi:

http://www.webcom.com/~usej
aŭ por FTP:
ftp.webcom.com/pub/usej/

Ne hezitu viziti nin tie! Ni havas la plej novan novaĵon pri junularaj eventoj, malnovaj artikoloj de KTP!, kaj bildoj de Esperanto-eventoj. Ni havos e-poŝtan liston por junuloj. Dankojn al Sybil Harlow por krei ĝin. Aliaj komputilaj servoj sekvos. Ĉu ankaŭ vi lertas pri komputiloj kaj povas helpi iom? Kontaktu Sybil (sybilh@calweb.com) aŭ nin ĉe usej@webcom.com

### Ĉu vi interesiĝas pri la kulturo de Esperanto?




La kvina Kultura Esperanto-Fesivalo okazos en Kopenhago, Danio, de la 6-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1996. Pli ol tri tagoj dediĉitaj al muziko, teatro, poezio kaj aliaj fakoj de la Esperanta kulturo. Se vin interesas vi povas skribi al:

Jacob Nordfalk
Rådmandsgade 53, 2TH
DK-2200 København N
Danio
RETO: nordfalk@fys.ku.dk



### Lokaj Kluboj: Atentu!

Ni planas havi konstantan lokan kluban sekcion de KTP! Ni ankaŭ pretigas broŝuro pri kiel komenci klubon; se vi havas kontribuaĵojn sendi ilin. Do, bonvolu skribi pri viaj klubnovaĵoj, atingoj, sukcesoj ktp, al:

Gaj Menaĥem
2049 Larchmont Way
Clearwater, FL 34624
fakso (813) 536-8958

### Ĉu vi estas perfekte (mal)juna?

Kiu estas la perfekta aĝo? Laŭ unu raporto de Teen Speak, 12 jaraĝuloj respondis, ke la perfekta aĝo estas 17-jaraĝa. Male, 17- kaj 18-jaraĝuloj diris ke ili volas esti iom pli aĝaj, ĉirkaŭ 21- aŭ 22-jaraĝaj. Kaj kion tiuj maljunaj 22-jaraĝuloj respondis? Kompreneble, ili volis esti iom pli juna — ĉirkaŭ 17- aŭ 18-jaraĝaj.

La leciono de ĉi tiu rakonto: Estu feliĉa kaj ĝuu la vivon, senrigarde kiun aĝon vi havas!

### Se vi intencas vojaĝi Esperante...



Passporta Servo estas aĉetebla nun. Ĝi estas internacia libro de gastigontoj por esperantistoj. Estas vere netaksebla elturnigo por junaj Esperantisotoj. Oni povas aĉeti ĝin de TEJO por 12 NLG plus postaĵo.

TEJO
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando
RETO: tejo_oficejo@bn.maus.de

### "Strange. . . mi pensis, ke mi estis la sola Esperantisto tie ĉi"



Antaŭ nelonge, mi ricevis interesan leteron de informpetinto kiu studas la italan ĉe la universitato de Pittsburgh. Bonŝance, tie ni havas jam du membrojn, kiuj espereble kontaktis lin intertempe.

Se mi ne konus ilin, verŝajne mi neniam pensus, ke estas iu ĉe la universitato helpi tiun informpetinton. Bedaŭrinde, mi ne scias ĉe kiuj aliaj universitatoj ekzistas aliaj Esperantistoj. Jen kie mi scias ĝis nun:

- Georgetown University (DC)
- Georgia State (Athens, GA)
- Indiana State (Bloomington, IN)
- Johns Hopkins (Baltimore, MD)
- MIT (Cambridge, MA)
- San Diego State (San Diego, CA)
- U. of New Mexico (Albequerque, NM)
- U. of Texas, Austin (Austin, TX)
- U. of Pennsylvania (Philadelphia, PA)
- U. of Pittsburgh (Pittsburgh. PA)
- U. of Houston (Houston, TX)
- Yale University (New Haven, CT)
- Loyola Marymount (Baltimore, MD)
- UC Berkeley (Berkeley, CA)

Ĉu ni maltrafis vin? Metu vian nomon sur la liston, por ke vi kaj ni sciu, kiu ekzistas kie!